# Aŭstraliaj Esperantistoj

**Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj**

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 24/06/2021 Kvincenttrideksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## Entute 808,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **278,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **230,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **205,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **95,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde septo 2021)

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).




N.ro 40 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En "Li manĝis la tutan torton, kiu estis por ĉiuj", la frazo "kiu estis por ĉiuj" nomiĝas "SUBFRAZO(= SUBORDA FRAZO) ĈE LA OBJEKTO DE LA ĈEFFRAZO (= ĉefpropozicio)". Kiu estas tiu objekto?

2). Subfrazo, kiu mem devas havi subjekton kaj predikaton (verbon) kaj povas havi objekton kaj adjektojn, plej ofte donas pliajn informojn pri la kernvorto de subjekto, objekto, aŭ adjekto.

La subfrazo do plej ofte agas kiel adjektivo, ekz. "....... la floro, KIU ESTAS RUĜA", similas al "..... la floro ruĝa = la RUĜA floro". Kiu vorto en la subfrazo ripetas la vorton "floro" en la ĉeffrazo"?

3). Propozicio (= frazo) havas du aŭ tri aŭ kvar frazpartojn: necesajn subjekton kaj predikaton, kaj eventualajn objekton kaj adjektojn. En la frazo "Li ĉiam estis fidela amiko" troviĝas kiom da tiuj frazpartoj, kaj kiuj?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 536. *Marcel Leereveld.*

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.




Kiel kunlabori kun la retradio **Esperanta Retradio** **18a Junio 2021**

# " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 19a de junio estis la tria sabato. Venis Roger kaj John.
La vetero estis terura. La vento blovis kaj la pluvo falis. Malgraŭe estis bona kunveneto. *Roger S*

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*




***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Kiu estis Lidia Zamenhof?



Gastigite de Tara Jabbari

Jen, gekaraj, de Tara Jabbari, altkvalita prezentado pri la vivo de Lidia Zamenhof kaj, inter multaj aliaj herooj en Esperantujo, ankaŭ pri la germana esperantisto, Fritz Macco, kiu sinofere kaj kuraĝe klopodis savi ŝin dum la dua mondmilito. (Bv. vidi paĝon 356 de *LIDIA - La vivo de Lidia Zamenhof Filino de Esperanto:* Lidja Zamenhof - Vikipedio (wikipedia.org) https://bel.bahai.de/bahaismo-kaj-esperanto/lidia-zamenhof/

Dum vizito al Nov-zelando rakontoj vortigitaj de karmemora bahaa esperantisto, Hartmutt Grossman (1933 - 2017), kiu grave rolis en Universala Kongreso antaŭ 21 jaroj (Tel Aviv), tre inspiris al Tara por podkaste enscenigi: 'Who Was She?' A New Podcast by Tara Jabbari - Baha'i Blog (bahaiblog.net)

Se vi scipovas la anglan lingvon bonvolu komenti interaktive ĉe Bahai Blog kies proprietulo, samkiel ĉiuj posedantoj de **l**a ĉefaj **anglalingvaj** blogoj de la bahaa mondo, t.e. *BahaiTeachings.org, Baha'i Chronicles, Baha'i@Reddit,* maljuste baras eĉ komenteton de tiu ĉi aŭstralia vero-atentiganto; anglalingve: *whistle-blower*. Ne ĝenas min persone ke riĉaj bahaanoj kaj influhavaj bahaaj akademianoj en Aŭstralio, Britio kaj Usono rifuzas ekdiskuti la eblon ke ili mem, kiel unuopaj bahaanoj, devas obei la instrukciojn de Abdul Baha pri Esperanto - eĉ se la zamenhofa lingvo ne finfine estos la monda help-lingvo. Al tiuj kiuj pretendas esti bahaanoj la problemego eksterordinara estas ke por eviti sendependajn enketojn pri la rolo de Esperanto, kaj eĉ pli serioze, eĉ pri la fundamenta bahaa principo de universala helpilo mem, ili rompas aldonan fundamentan principon pri la devo okazigi travideblan kaj veran konsultatdon: Baha'i Youth Move the World (bandeeducation.com) Oni ne imagu ke miaj kritikoj, kies deveneco naskiĝis jam en 1990, de tiaj bahaaj estroj, kies amo al la angla estas senbrida, ĉiam estis akraj. Ĉar ilia rifuzo dece interkonsiliĝi kun vi estas tiom damaĝa ke mi ne vidas alternativan aliron al tiu ĉi eterna problemo kaŭzita de religiaj estroj. Amike *Paulo* (ne la Apostolo *Paul Desailly*



## Ĉinio preterpasas unu miliardon da vakcinadoj de sia popolo; Ĉina popolo gajnos gregan imunecon antaŭ Dec. 2021



*Roger Springer*



China passes 1b shots mark; eyes herd immunity by Dec - Global Times

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# ĈU LA ANGLA VERE ESTAS LA INTERNACIA LINGVO, KIEL ANGLAPAROLANTOJ ŜATAS KREDI?


EUROVISION
Kanta konkurso
ROTTERDAM 2021

Mi ĝuas rigardi la Eŭrovido-Kantokonkurson (*Eurovision Song Contest*) jam ekde ĝia komenco en 1956, kiam ĉiu konkursanto kantis en sia propra lingvo. Kvankam la stilo de la konkurso ne ŝanĝiĝis, kelkaj konkursantoj nun kantas en la angla. Ĉi-jare, nur 23 el la 43 partoprenantoj kantis en siaj denaskaj lingvoj kaj la ceteraj 20, en la angla.

Kial ĉi tio okazis? Mia teorio estas, ke la kantoj prezentitaj en lingvoj aliaj ol la angla ne gajnis popularecon ekster siaj originaj landoj. Tial, la prezentantoj ne fariĝis internacie popularaj kaj la muziko-registrantaj firmaoj ne povis fari profiton.



Do, ĉu estas amo de la angla kiu gvidis al la ŝanĝo, aŭ ĉu la kialo estas nur pro mono kaj renomo? *Trish O'Connor*






**3ZZZ**.. Eble vi scias multon pri la tragedio de la ŝipego Titanik , eĉ vidis la filmon . Tamen en la elsendo de la 21a de junio troviĝas informoj , ne tre konataj pri la kaŭzo de la akcidento. Vi lernos ankaŭ kiel fabeloj pruvas ke homoj , kie ajn ili loĝas sekvis similan evoluon. Tiuj, kiuj lernis la lingvon pere de la rakonto " Mazi en Gondolando" eble ŝatus la komponaĵojn de Korvaks, novzelanda "komponisto".

**Grava anonco:** la nova dato por la jarkunveno de la Esperanto-grupo en 3zzz estas la 2a de julio je la 4 posttagmeze en la radiostacio en Albert strato , Brunswick ....*Franciska Toubale*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Forpasis Betty Broadbent





Ĵaŭdon mi ricevis telefonvokon de Henry Broadbent. Li anoncis al mi la malĝojan novaĵon : la antaŭan vesperon , merkredon la 16an de junio, Betty, lia kara edzino, forpasis . Pro aĝo Betty kaj Henry retiriĝis en Sunbury, nord-okcidente de Melburno, en rezidejo por maljunuloj kaj ne plu havis multe da kontaktoj kun esperantistoj . Sed ili estis aktivaj en la 90aj jaroj kaj la komenco de ĉi tiu jarcento. Betty estis sekretariino de la Viktoria Federacio. Pro ŝia intereso pri historio kaj ŝia konscio pri la graveco lasi spurojn por niaj posteŭloj , ŝi kompilis la arkivojn de la Viktoria Federacio kaj produktis libreton pri la historio de tiu asocio. Betty estis trankvila, saĝa persono, de kiu valoris peti konsilon . Pro la stranga periodo, kiun ni travivas ,ankoraŭ ne estas decidoj pri la funebraj ceremonioj honore al Betty . Betty , ripozu en paco. *Franciska Toubale*



# Dum monda milito 2, Wuhan suferis flugarmeajn atakojn



Unu semajnon antaŭ Kristnasko en 1944, preskaŭ 200 usonaj aviadiloj atakis la ĉinan urbon Wuhan, faligante 500 tunojn da brulbomboj. Miloj da ĉinaj vivoj perdiĝis en ĉi tiu okazaĵo. *Roger Springer*

[The US Firebombing of Wuhan, Part 1 – China in WW2 (chinaww2.com)]



**SOLVO DE LA KVIZETO 40**


1). la tutan torton.
2). "kiu".
3). a). 3.
b). "Li" (= subjekto); "ĉiam" (= adjekto); "estis fidela amiko" (= predikato).

*Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Ivermectino sanigis 97% de kovidaj pacientoj en Delhi

Justus R hope, MD7a junio 2021




Ivermectin obliterates 97 percent of Delhi cases | National | thedesertreview.com

Ivermektino *(ivermectin)* estas la sekura, reuzita Nobel-premiita drogo, kiu efike reduktas morton pro COVID-19 ĝis 91%. Ĝi ne kaŭzas drastajn imunajn reagojn. Kaj ĝi reduktis la COVID-19-kazojn en Delhio, Barato, per miriga 97% en kvin semajnoj.

La problemo estas ke ĝi kostas tro malmulton da mono, do ne estus granda profito

Aŭ ĉu ĝi estas alia falsa espero aŭ mensogo?.

Klinikaj provoj pri ivermektino ŝajne esti faritaj antaŭ julio. *Roger Springer*

## Jen anonco de Melburno.



"La membroj de la Melburna Esperanto klubo nun renkontiĝas la unuan kaj la trian lundojn en la monato. Naŭ membroj ĝuis la prelegon pri Oomotto kantfestivalo kaj ankaŭ la gramatikekzerco kune kun babilado kaj bongusta manĝeto." Amike *Heather Heldzingen*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



# M i s e t o d e Z a m e n h o f .

## LA ĈEFMINISTRO REE NE AGIS !

La sekretaj sekurecoinstancoj konsiladas al la registaro kiel agi en kazoj de nacia sekureco. Ili ne rajtas konsili pri kiel trakti la komercon. Antaŭ kelkaj jaroj ili tamen faris, pro insisto de la tiama registaro. Tio okazis, kiam la aŭstralia registaro penis ricevi pli da decidoj de la registaro de Orienttimoro pri la aĉeto de petrolo ĉirkaŭ tiu lando. Tiuj intertraktoj havis nenian rilaton kun sekureco, sed estis pure komercaj. La sekurecinstanco spionis sur la registaro por scii ties celojn.

Unu membro de la sekurecoinstanco sciis, ke tio ne estas farinda de lia sekurecoinstanco, kaj publikigis tion. Rezulte de tio la homo elĵetatis el la sekurecinstanco kaj la registaro akceptis tion. Sed okazis pri tio batalo en korto, kaj la sekureculoj zorgis, ke ankaŭ la juristo por la antaŭa membro de la instanco estu punata.

Tio estas grava malĝusto, kaj unu el niaj tagĵurnaloj jam postulas ke la registaro devas interveni por ĝustigi la aferon. Sed Scott Morrison ne volas aŭ ne kuraĝas. Tre granda agmanko de nia registaro por honesteco! *Marcel Leereveld.*

## POR ESPERANTOLOGOJ .

Por klarigi kial substantivoj de Esperantaj (ja adjektivaj) participoj estas aŭtomate personoj, Zamenhof diris, ke oni sentas la konkretecon de la ago tuj kiam oni uzas participan substantivon. Do ke oni sentas ĉiam ke se mia patro revenos morgaŭ li estas la revenontulo, pro la participa substantivo "revenonto".

Mi opinias ke tia klarigo per la sentata aŭtomata konkreteco de la substantiva participo estas malĝusta, kaj mi donos la ialojn, kaj poste mian opinion kial participaj substantivoj estas ĉiam konsiderataj kiel konkretaj, do ke la ago estas farata de homo.

Se oni diras, ke ia akcidento ree venos, revenos, oni same forte sentas la konkretecon de la ago de la reveno kiom oni sentas tiun konkretecon kiam oni mencias la akcidenton kiel la revenonton. Do ne estas la substantiva participo kiu diras ke la aganto estas aŭtomate homo. Sed kio do diras tion? Por respondi al tiu demando, observu la jenan paron:
"La akcidento certe iam revenos kaj estas la revenonto" kaj
"La akcidento certe iam reokazos kaj estas la reokazonto".
En la unua frazo ni sentas la konkretecon de la ago, do ke la aganto estas nur homo, dum en la dua frazo la ago okazas per si mem, ne perfarate de homo. Do estas la speco de verbo kiu diras, ĉe "okazos" kaj ĉe "okazonto", ke la aganto ne estas homo, kaj ĉe "revenos" kaj "revenonto", ke la ago farotas de konkretaĵo, do de homo. Kaj kial do la substantiva participo ĉiam indikas homon? Simple ĉar iu decidis ke substantiva participo indikatas nur de homo, kaj mi decidis tion oficiale antaŭ trideko da jaroj. Mi rajtis fari tion, ĉar mi aplikis de Zamenhof neformulitan sed de li aplikatan regulon, ke iu ajn Esperantisto, unufoje, rajtas deklari ke ĉe sufikso aŭ finaĵo kun du signiferoj oni rajtas uzi, se ankoraŭ neuzata, la vorton kun nur unu el la du signiferoj. Ekzemple oni decidas ke ĉe substantiva participo, kiu ja havas la signiferojn de tempo kaj de gramatika voĉo, oni uzu la vorton nur por indiki la pasivecon, ne la tempon. Do ke ĉe la sufikso "-ati" la verbo estas pasivvoĉa kaj ne prezenca. La prezenco esprimatas per la finaĵo "-as". "La hundo batATas/batATis/batATos de la viro".

Do nun fine Esperanto havas la unuvortan verban pasivan voĉon, danke al tiu neoficiala sed Zamenhof'a "Regulo pri Signiforedukto". Se Kalocsay estus nur vivanta iom pli longe, aŭ se mi estus nur trovinta la solvon iom pli frue! *Marcel Leereveld*.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***